# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris 34, rue de Chabrol PARIS -10° tel.770-55-03

MARTO - APRILO 1973 N° 4

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

C E N U M E R O E S T T R E S I M P O R T A N T ..........

- parce qu'il vous invite au CONGRES DE LA FEDERATION PARISIENNE qui se deroulera à PARIS en même temps que celui de la Fédération Normande.
- parce qu'il vous fait part d'une grande nouvelle : Un local situé près de Bastille a été acquis par U.F.E. (voir page 2)
- parce que deux réunions vous sont prosées ci-dessous, auxquelles vous êtes instamment invités.
- parce qu'enfin nous rapportons le fait que le Conseil Général du Val de Marne a adopté à l'unanimité un VOEU en faveur de l'introduction de l'enseignement de l'ESPERANTO dans les écoles.

Entuziasme antaŭen !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

**Dimanĉo 11an de Marto** en SAINTE-GENEVIEVE-DES-BOIS (91)

je la 15a horo

1- "Pollando" kelkaj memoraĵoj per diapozitivoj
2- "Nice et son Carnaval" , en couleurs
3- Goûter amical offert gracieusement
4- "Nova Zelando" film en Espéranto.

Inscrivez-vous de suite auprès de s-ro HENRY H. 9,résidence Rochebrune 91220 BRETIGNY SUR ORGE en indiquant vos nom et adresse ainsi que le nombre de personnes. Dites aussi si vous désirez qu'une voiture vienne vous chercher à la gare vers 14.45 H. Dès réception de votre lettre toutes précisions vous seront fournies en retour.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

**Vendredo 6an de Aprilo** en P A R I Z O

je la 19a horo

Gare Saint-Lazare - Galerie des Marchands - Salle du Photo-Club S N C F .

J U G O S L A V I A V E S P E R O , en rilato

kun la 58a Universala Kongreso -Beogrado -

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

K O M U N A K O N G R E S O

D E L A N O R M A N D A K A J P A R I Z A F E D E R A C I O J

**Sabato 28an de Aprilo** e n C H A B R O L

**Dimanĉo 29an de Aprilo** en CENTRE INTERNATIONAL D'ACCUEIL DE PARIS 30, rue Cabanis.Metrostacio: Glacière aŭ Saint-Jacques.

PROGRAMO kaj ALIĜILO entenataj en tiu ĉi bulteno. Ilin legu ATENTE.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## NIA DOMO....fine !

La komisiono elektita en Nantes havis kiel mision la taskon esplori la eblecon akiri propran sidejon por la Asocio. Tiom pli urĝas la solvon, ke ni estas nun baldaù pelotaj el nia malnova loĝejo, rue de Chabrol : fakte ni estas nun asignitaj antaù Tribunalon.

La komisiono, vizitinte diversajn loĝejojn, kiuj montriĝis diverskiale ne taùgaj, fine malkovris, se ne la "raran birdon", almenaù ion tute konvenan por niaj celoj kaj respondan al niaj eblecoj. Temas pri butiko, je 100 metroj de Bastille, sekve facile alirebla de preskaù ĉiuj punktoj de Parizo, ĉe-angulo de du stratoj, en domo ĵus renovigita : du montrofenestroj, unu ĉambro por la butiko propredirita, kaj du malpli grandaj ĉambroj, kaj kelo ebliganta loĝigi bibliotekon, ŝrankojn kaj similajn.

Nun, la financaj rimedoj. La prezo de la akiro estas 80.000 frankoj, al kiuj devas aldoniĝi la kostoj ŝtataj kaj notariaj, kaj la diversaj riparoj kaj aranĝoj, entute proksimume 120.000 frankoj. En la kaso, disponeblaj : 80.000 fr. Necesas do trovi kiel eble plej rapide 40.000 frankojn. Ni kalkulas je VI CIUJ. Ĉiu donaco estos plej bonvena. Ni ne forgesu, ke la Esperantistoj jam antaù dudeko da jaroj solvis la problemon de la Grezijona akiro, kaj ke simile la S.A.T.-anoj kapablis aĉeti sian sidejon; ĉu ni estos malpli lertaj aù malpli donacemaj? NE! Al niaj poŝoj!!! Jam dum la Konsilantara kunveno, kiu decidis pri la sidej-akiro, venis du donacoj : unu 1.000-franka kaj unu 100-franka.

E N S K R I B I Ĝ U ! Sendu ĉekojn, poŝtmandatojn, ktp., kaj tre baldaù ni, t.e. U.F.E., estos la posedantoj de propra butiko-oficejo en Parizo, kio estos la plej konkreta parto de la kapitalo de nia Asocio.

La nomo : ESPER-antisto ne estu nur simbola!

Dankon!
Roger BERNARD,
membro de la Komisiono

La donacantoj skribu sian ĉekon "Payez à l'ordre de l'Union Française pour l'Espéranto", kaj sendu ĝin al U.F.E.

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## APPEL AUX RETARDATAIRES

Le prochain bulletin sera envoyé aux seuls membres ayant réglé la cotisation 1 9 7 3 .

Membre adhérent (sympatisant ou conjoint)............... 8 fr.

Membre titulaire....................................... 38 fr.

Nous rappelons que statutairement seuls participent aux votes dans les congrès les membres titulaires, bienfaiteurs, donateurs et à vie.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Avez-vous remarqué que le CALENDRIER des réunions ou manifestations se trouve toujours à la dernière page du bulletin?

Consultez-le et notez les dates sur votre propre calendrier.

MERCI!

PARIS-ESPERANTO — Ŝaŭmanta sed ne dronanta — Informoj de la Pariza Grupo —

## Unu laborplano..... kial?

La dua baza laborplano de UEA estas nun reviziata: kaj ĉiu landa asocio, ĉiu loka grupo, ĉiu individua membro estas alvokitaj kliniĝi super la planon por konstati kio estis jam plenumita, kio restas ankoraù nun realiĝanta, kaj kio estus laù la nunaj cirkonstancoj bondezirinda.

Sonas do la ĝusta tempo por fari bilancon kaj formuli la novajn proponojn. Post la kongreso en Beogrado, kiam la tria laborplano estos akceptita, venos la momento nur adapti konforme al ĝi nian propran laborplanon; sed estos tro malfrue por prezenti novajn celojn, kaj tiam neniu plu diru, ke la plano estas kvazaù trudita de UEA!

Antaù ĉio kial fari laborplanon? La respondo estas memevidenta. La agkampo por Lingvo Internacia estas tutmonda: nur agado kunordigita en ĉiuj anguloj de la mondo havas ŝancon por trafe efektiviĝi kaj efike influi ĉiujn mediojn. Tial necesas antaùvidi laù kia prioritateco oni elektu tiun aù tiun taskon, tian aù tian celon, tiel ke ĉie samtempe aldoniĝu kaj ne perdiĝu vane la penoj.

Iom da historio! La unua laborplano akceptita en la Kongreso de Bologno (1955) estis aplikata de 1955 ĝis 1962: ĝi atingis sian ĉefan celon, la reorganizadon de la movado. La dua akceptita en Kopenhago (1962) celigis de 1962 ĝis 1972 plibonigi la harmonian kunagadon de la diversaj asocioj fakaj kaj nefakaj. Verfakte la unua reformis la centran funkciadon de UEA, la dua tiun de la landaj asocioj (interalie, UFE); la tria sendube devos substreki la reformadon de la lokaj grupoj.

Efektive, se ni ekzamenas plej objektive, kion faris la Pariza Grupo rilate al la eroj de la Dua Laborplano, la rezultato estas nek peza nek dika.

Certe la rilatoj kun la landa asocio estas harmonie aranĝitaj (d), ĉiuj membroj de la Grupo aliĝas al ĝi (e), ekzistas multaj delegitoj en Parizo (f), la Grupo kiel eble plej helpis al aliaj en apudaj lokoj (g), la kursoj estas konstantaj (h) kaj la kursfinintoj pleje membrigitaj (ĥ).

Sed nur de kelkaj monatoj denove plene funkcias estraro kaj konsilio (a), kunvenejo restas ankoraù trovota (b), nur malmultaj eksterlandaj kontaktoj estas provataj (c), se la junulara sekcio ekzistas, ĝi plej ofte fantome brilas en la aranĝoj de la Grupo (ĉ), la informa fako meritus pli vastan kunlaboradon (ĝ).

Fine la nombro de la membroj ankoraù ne obligas formi pli fake organizitajn sekciojn (i), nur dank'al la konversacia rondo refunkcias regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj, kiuj devus pli ampleksiĝi ĉefe laù partoprenado (j), la uzado de la lingvo pli boniĝis kaj vastiĝis (ĵ), la helpo al UFE povus esti pli granda (k), la membroj devus eniri en diversajn mediojn por prezenti al ili la lingvon (l).

Sume ĉiu membro de la Pariza Grupo primeditu sian agadon por esperanto kaj trovu en la bilanco novajn kaùzojn por alporti pli freŝan energion:

"Kaj altiĝu la kuraĝ'
ĉar la fino de l'vojaĝ'
estos nepre la triumfo de l'afer'...
La fluanta tajdo estas nun ĉe ni. (Grabowski)

La prezidanto:
Jean Thierry.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk. FEDERACIA KONGRESO- INFORMOJ .fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.

- Por prepari sian komunan kongreson normandoj kaj parizanoj kunvenis en Evreux la 28-an de januaro 1973.

- HELPAS DUOBLE, KIU HELPAS RAPIDE! DO! Sendu senprokraste vian aliĝilon por ke la organizantoj havu pli da oportuneco por prilabori la multnombrajn detalojn de la afero! Dankon!

O-o-o-o-o-O **PASINTAJ KUNVENOJ**

NEFORGESEBLA . . . . ĝi estis anoncita! Kaj fakte ĝi estos! Pri kio temas? Memoru la kunvenon de 12-a de januaro 1973 okaze de la KUKFESTO! Antaùe s-ro Peray kun la amika helpo de ges-roj Benazech kaj Doury estis preparinta la terenon. Tiel ke je la alveno la partoprenintoj troviĝis jam en la ĝusta etoso.

Komence, ni aùdis poemon de Raymond SCHWARTZ, ilustrita per diapozitivoj. Poste Sonia, Sylvie kaj Jean-Pierre deklamis; Daniel kaj Claudia ludis skeĉetojn kiuj ridigis la ĉeestantaron. Intertempe, la prezidanto de la pariza grupo, Jean Thierry bonveniginte la partoprenantojn, inter kiuj li aparte salutis ges-roj JULLIEN el Aix-en-Provence, ankaù diris propran poemon laù kabareda maniero. Dominiko agrable kantis ludante gitaron.

La fino de io agrabla estas ĉiam malgaja. Ĉi-foje ne! ĉar la fino de la distra parto anoncis la malfinon de la franda parto. Ĉiuj ricevis kukon, sandviĉojn, trinkaĵon en sufiĉa kvanto por forigi la malsaton kaj tamen ne transpasi la limon de la dececo!

La fato falis sur du viktimojn: s-ino Rousseau kaj s-ro Driolle trovis la fabon kaj s-ro Peray surmetis al ili la kronon. Oni trinkis je ilia sano dum la lumfulmo de la fotaparatoj funkciis.

Kiom ni estis? NUR 60! ĉar laùdire pluraj personoj preteratentis la daton, ne sufiĉe atente leginte la numeron 3-an de nia bulteno, kie la afero estis dufoje menciita!

Por la venontaj kunvenoj, ne faru kiel ili, kaj se eble lernu perkore la kalendaron kiu troviĝas malsupre de la lasta paĝo.

Jack A. ROUSSEAU.

LUKSEMBURGIA VESPERO - ( 16-an FEB 1973 ).

Kuŝante ĉe la kruciĝo de pluraj irvojoj, Luksemburgio aspektas kiel oazo meze de Eùropo okcidenta. Tie, la vojaĝanto renkontas montojn, valojn, riverojn, florojn, kiuj alportas trankvilecon kaj ripozon. La vasteco de tiu sendependa lando ne estas tro granda, por ne ebligi kun facileco la rapidan malkovron de ĉiuj siajn belaĵojn.

Tiujn belaĵojn s-ro DOURY montris al ni pere de diapozitivoj. Ni eĉ povis havi ideon pri la kongresa etoso, rigardante la bildojn de la kongreso de FFEA en Clervaux (pasinta oktobro).

- poste francparolanta filmo prezentis al ni tre diversajn aspektojn de la vivo en tiu agrabla regiono kaj i.a. de ĝia ĉefurbo, Luksemburgo, kiu meritas akcepti pli ol la 93 kongresanoj jam enskribitaj ĝis nun por la Nacia Kongreso de U.F.E. kaj la Unua Eùropa Kongreso de EsperantO.

Estas ankoraù tempo por aliĝi: tio estas amika konsilo de iu, kiu jam plurfoje vizitinte Luksemburgon sinpreparas kun sama plezuro revidi ĝin en venonta junio.

J.A. ROUSSEAU

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.FEDERACIA KONGRESO - INFORMOJ .fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.fk.

VOĈDONADOJ - Dum la ĝenerala asembleo de 29-an de Aprilo okazos DU balotoj.

1) - U.F.E. - Vi devos aprobi (aù NE) la moralan kaj financan raportojn, kiujn vi devas legi en la revuo FRANCA ESPERANTISTO. Ankaù en tiu revuo estas listo de kandidatoj por la renovigo de la U.F.E.- Konsilio.

2) - Morala kaj financa raportoj kaj listo de kandidatoj estos prezentataj al vi FEDERACIO DE LA PARIZA REGIONO la 29-an de Aprilo.

Rajtos voĉdoni nur la membroj abonantaj, bonfarantaj, donacantaj kaj dumvivaj.

"UEA TEJO JEFO JGPR UEA TEJO JEFO JGPR UEA TEJO JEFO JGPR UEA TEJO JEFO JGPR"

## J U N U L A R A   G R U P O   D E   L A   P A R I Z A   R E G I O N O

Se vi ankoraŭ ne scias la signifon de la supraj literoj legu la jenajn klarigojn:

U.E.A. = Universala Esperanto - Asocio
T.E.J.O. = Tutmonda Esperantista Junularo Organizo
J.E.F.O. = Junulara Esperantista Franca Organizo
J.G.P.R. = Junulara Grupo de la Pariza Regiono.

---

### P K S ' 7 3

La paska kultura Semajno 1973 okazos ek de merkredo la 11-a ĝis la 17-a de aprilo 1973, en la kastelo de Grésillon, apud Baugé.

La temo estas "KUNVIVADO": (kunvivado inter homoj; kunvivado inter socioj; kunvidado inter malsamaj politiksistemoj; kunvivado inter generacioj).

PREZO en komuna ĉambro: 160 Fr. Sendu aliĝon kiel eble plej rapide al: André Grossmann Bât. D2, rue de la Doller- 68110 ILLZACH.

C.C.P.: Organisation de la Jeunesse Espérantiste Française 31 709 94
LA SOURCE.

---

### TEJO KONGRESO 1973

( 29-a IJK )

Tiu kongreso okazos en Serajevo (Jugoslavio) ek de 21-a ĝis 27-a de julio 1973. Ĉar la kongreso okazos antaŭ la 58-a U K de Esperanto, okazonta en Beograd, la kongresanoj havos la eblecon partopreni ankaŭ la U K -on.

La kongresa programo konsistos el laborkunsidoj, seminarioj, kultur amuzaj aranĝoj, renkontiĝo kun la loka junularo, studvizitoj kaj ekskursoj.

La ĉeftemo diskutota dum la kongreso estos :JUNULARO KAJ HOMMEDIO.

Pri kotizo kaj aliĝo petu informon: 34, rue Chabrol -Paris.

---

### PARIZA JUNULARO

1) - E S P E R A N T O - K U R S O :

ĉiu merkrede je la 19.30 H. en la Kelo :

"Au rendez-vous des Amis" 10, rue Sainte-Croix de la Bretonnerie
Paris (IV).

2) - P A R I Z A F E D E R A C I A
K O N G R E S O :

Venu AMASE! (legu detalojn en tiu-ĉi bulteno)

-o-o-o-o-o-o-
-o-o-

## MOTION EN FAVEUR DE L'ENSEIGNEMENT DE L'ESPERANTO

Monsieur Michel GIRAUD, Maire du Perreux, Secrétaire du Conseil Général du Val de Marne, Président du District de la Région Parisienne, par lettre datée du 18 Janvier 1973, a annoncé à M. R. Despiney, Président du Centre Culturel d'Espéranto du Perreux, que la motion suivante a été adoptée à l'unanimité par le Conseil Général du Val de Marne, lors de sa toute dernière séance.

" LE CONSEIL GENERAL DU VAL DE MARNE,

CONSIDERANT :

- l'accroissement rapide des relations internationales dû aux constants progrès des moyens de transports et de télécommunications,
- le désir de chaque peuple de développer sa propre culture,
- la diversité des cultures, patrimoine de l'Humanité,
- le danger que serait pour ce patrimoine l'expansion d'une langue nationale sur le plan mondial,
- la nécessité d'une paix basée sur la mutuelle intercompréhension des peuples,
- la valeur incontestable de l'Espéranto, langue neutre internationale,
- la solution apportée par l'Espéranto aux problèmes posés par les barrières linguistiques,

DEMANDE : que l'ESPERANTO soit admis comme langue facultative dans l' Enseignement Secondaire. "

-o- Franca Katolika Esperanto Asocio anoncas sian nacian Kongreson, kiu okazos en PARIZO (apud la preĝejo Sacré-Coeur) 12/13-an de Majo 1973. Peti informojn de S-ro Despiney 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## K A L E N D A R O — M A R T O - J U L I O 1 9 7 3

| | |
|---|---|
| MARTO | |
| 11 | Dimanĉa Kunveno en Sainte-Geneviève-des-Bois (vidu ĉe paĝo 1-a) |
| 17 | Konsilia Kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.45 H. Iu ajn membro rajtas partopreni kiel observanto. |
| APRILO | |
| 6 | Jugoslavia Vespero en Parizo (vidu ĉe paĝo 1-a) |
| 11-17 | Paska Kultura Semajno 1973 en Grezijono. |
| 14 | Estrara Kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.45 H. |
| 28-29 | FEDERACIA KONGRESO en PARIZO (vidu ĉe paĝo 1-a) |
| MAJO | |
| 12-13 | Nacia esperantista katolika kongreso (vidu supre) |
| 19 | Konsilia Kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.45 H. Iu ajn membro rajtas partopreni kiel observanto. |
| 20 | Dimanĉa Kunveno en le Perreux (rezervu tiun dimanĉon) |
| JUNIO | |
| 9-11 | Eŭropa Esperanto-Kongreso, Luksemburgo. |
| JULIO | |
| 28-4/8 | 58-a Universala Kongreso, Beogrado, Jugoslavio. |

ooooooooooooooo
ooooooooooo
ooooooo
ooo